# *Mondo de Espero por la kubaj infanoj.*



La monda asocio pri speciala edukado (AMEE) transdonis al  Kubo la premion *Mondo de Espero* okaze de la agado farata de la insula ministerio pri edukado dum pli ol 50 jaroj favore  al infanoj kun handikapoj.
La premio estis ricevita de Cira Piñera, vicunua ministro de la koncerna ministerio, dum la malferma ceremonio de la XII-a monda renkonti?o pri speciala edukado kaj atento al diverseco,  okazanta en la kongresa palaco de Havano.
Orlando Terré, prezidanto de la monda asocio, elstarigis ke la kuba eduka sistemo jam trairas la vojon de integri?on kaj oni perceptas la transformojn entreprenitajn favore al tio ke la infanoj kaj junuloj kun limigoj malseveraj fiziko-motoraj a? mensaj, eniru al la normaj lernejoj, ?io danke al ?tata kaj registara klopodo premiinda.
Dum la evento li elstarigis la agadon de kelkaj kubaj edukistinoj kiuj dedi?is sian vivon al specialecoj kiel logopedio, defektologio kaj fizioterapio, kio havigis al ili la distingon “Por la latinamerika unueco” de la latinamerika centro de referenco por speciala edukado (CELAEE).
La kvalito de la atento donita de Kubo senpaga al pli ol 60 mil infanoj kun specialaj edukaj bezonoj igis ke la kariba lando estu elektita kiel sidejo de tiu ?i XII- monda evento, kie kunsidas pli ol 150 delegitoj el 21 landoj de Iberoameriko kaj Nordameriko.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/25632-mondo-de-espero-por-la-kubaj-infanoj

**Radio Habana Cuba**